

La Suda Kruco

Organo de la Australiaj Esperantistoj.

Redakcio-Administracio :

Box 1367, Elizabeth-st. P.O.
Melbourne (Australio).

Abono (por dek du numeroj) :

Australio : 3 shilingoj.
Ekster Australio : 3 sh. 9 p.
au 18 respondkuponoj.

Anoncoj : Por 3 linioj : 1 shilingo au 4 respondkuponoj.

N-ro 4,

Melburno (*Melbourne*) Australio.

Oktobro, 1920.

ESPERANTO: LA MALBELA ANASIDO.

The director of education in Liverpool, Mr. J. G. Legge, is one of a number of eminent educationists who have given their support to Esperanto. Speaking at a meeting of Esperantists in Liverpool, he said that he had learned the language many years ago, and had always retained a real sympathy with the movement. He strongly believed in lingual education. It is an enormous advantage for young people to learn some other language than their own; from the point of view of intellectual training, he rather envied our Welsh friends in that so many are bi-lingual. Our lack of grammatical knowledge was a serious handicap to us; those who had learned Latin were much helped in the acquirement of other languages, but he considered that Esperanto was quite as good an introduction to the study of modern languages.

Mr. Joseph McCabe, the well-known writer, expressed himself thus on the subject of Esperanto: "One of the most important elements of the new and saner international life we trust we are inaugurating is to introduce a common language. For that crusade the world owes Esperantists a debt. Polyglottism is one of the most inept and costly of our hesitations to have done with barbarism."

The International Free Thought Congress, which was to meet at Prague in September of this year, made use of Esperanto in advertising its activities. An excellent propaganda leaflet in Esperanto, setting out the arrangements and conditions of the Congress, was distributed throughout the world.

The international congress of the ex-soldiers and sailors' society, which met this year at Geneva, was so hampered by diversity of language, for its members came from all the belligerent countries, that it was decided to adopt Esperanto as the international language of the society, and to publish the society's journal in that language only.

The last "British Esperantist" contains an interesting account of a deputation which waited on the secretariat of the League of Nations in London to urge the adoption of Esperanto by that body. On behalf of the Secretary-General (Sir Eric Drummond), who is himself a strong supporter of Esperanto, the deputation was received by a Japanese secretary, Dr. Nitobe, who gave a sympathetic hearing, and promised to submit the memorial which had been prepared, and to give an account of the conference to the League. The five-year-old daughter of Mr. Butler (Secretary of the B.E.A.), who accompanied her father to the deputa-

tion, answered a number of questions in Esperanto, and translated a number of sentences into and out of Esperanto, showing the ease with which young children can learn the language. "Komenco bona, chio bona" may be said equally of the little Esperantistino and of the Esperantists' work with the League of Nations.

PUBLIC LIBRARIES AND ESPERANTO.

Esperanto has found its way into the principal public libraries of our two leading cities. In the Sydney municipal library, in the Queen Victoria Markets building, there is a small Esperanto section, containing textbooks and a few of the chief works of our literature. The librarian (Mr. Bertie), recognising the value of Esperanto, is desirous of increasing the number of Esperanto works in the library, and for that reason the notification is issued which is printed hereunder in Esperanto. It is hoped to have a representative stock of Esperanto books for the increasing number of Esperanto readers.

The public library of Melbourne has a good collection of books in Esperanto in its reference department. Besides text books and dictionaries, there are a number of books in nia kara lingvo under the headings of the various subjects, including a copy of the magnificent but too little known work of art, "Albrecht Durer: Lia Vivo kaj Verkaro." Most of these have been acquired on their own initiative by the library authorities from time to time, during the last twelve years.

In the public lending library of Melbourne there are also a number of Esperanto books, principally fiction.

POR HELPI ESPERANTON.

En la urba biblioteko de Sidnejo jam trovas sin malgranda kolekto de esperantaj libroj. La bibliotekisto, sinjoro Bertie, rekonante la gravecon de Esperanto, propravole akiris kelkajn librojn en nia lingvo. Sed estas bezone pligrandigi tiun fakon de la biblioteko; kaj samtempe estas okazo por montri la konstantan

kreskadon de Esperanto kaj ĝi praktikan uzadon en komerco kaj industrio.

Tial oni petas la Esperantistojn de la tuta mondo, precipe eldonantoj de libroj, broŝuroj, katalogoj, el de reklamaj folioj, sendi specimenojn al tiu biblioteko. Rekompenco oni ne povas promesi, krom la rekompenco de helpo kaj propagando de Esperanto.

Oni bonvolu adresi la librojn kun al "The Librarian, Municipal Library, Q.V. Markets, George Street, Sydney, Australio."

Ni antaŭe dankas!

SE VIA MALAMIKO MALSATAS

Responde al la Esperantista peto ricevita el Vieno, la monokolekto por helpi la mizerajn infanojn de Aŭstrio jam atingis pli ol dudek funtojn. Al chiu funto tiel kolektita la Angla registaro aldonas unu funton; tial la sumo ricevota de la malfelichuleto estas pli ol 40 funtoj sterlingaj (400 spesmiroj, laŭ antaŭmilita kalkulo).

Pli ol monon, oni bezonas en Centra Eŭropo nutron, kiu tiel mankas; sed la registaro de Aŭstralio (kie la nutro estas abunda, neniam ni sentis mankon) ne permesas sendi nutron al la eksmalmikaj landoj.

JARKUNVENO DE A. E. A.

La prokrastita jarkunveno de la Aŭstralia Esperanto-Asocio havis lokon en vendredo 15-a de oktobro vespere, en la "Hardware Club," 35 Little Collins-str., Melbourne. Laŭ la decido de la kunveno en la 2-a de julio, la komitato devas prezenti raporton pri la revizio de la regularo. Dum la lastaj tri monatoj la komitato pasigis laborplenajn tagojn kaj noktojn, konsiderante la novan regularon; se la Asocioj vidus la diligenton de sia komisiitaro, ili certe sentus por ĝi pli grandan respekton, konfidon kaj... kompaton.

La komitato fine ellaboris projekton de nova regularo, kiu espereble kontentigos kiel la Melburnajn membrojn, tiel ankau la izolajn kaj malproksimajn membrojn, donante al chiu ĝalan voĉon en la direktado de la Asocio.

Restas nun por la jarkunveno akcepti aŭ modifi aŭ malakcepti tiun projekton.

LA KOMERCA ESPERANTA KLUBO.

Speciala kunveno de la Komercas Esperanta Klubo (Melburno) okazos en la "Hardware Club," 350 Little Collins-str: en lundo, 11-a de oktobro.

La agendo estas: konsideri reformon de la regularo, kaj iun alian feron, kiun oni prezentos.

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO. CHIJARA KONCERTO.

La dek-dua chijara koncerto de la A. E. A. havis lokon kun granda sukceso en merkredo 8-a de septembro. La belan salonon de la "Austral Salon" okupis vigla audantaro el esperantistoj kaj amikoj; ilia nombro estis tiel granda, kiel oni povis esperi, pro la fakto, verŝajne, ke la koncerto estis malmulte reklamata.

La unua numero de la programo estis kvarvocha kanto de la Esperantista Kvarteto—fraulinaj Beryl Slater, Elsie Larcher, sinjoroj George Hussey, E. MacKenzie—"Esperanta Lando," verkita de mortinta Melburna samideano, doktoro McBurney. La muziko havas vervon kaj charmon; la kvarteto agrable kantis ĝin.

Sinjoro George Hussey, kies harpo estas tro malofte audata inter ni, tiam ludis verkon de Thomas, "La Adiaŭiro de la Harpisto al sia Patrujo," kun sia kutima delikateco. La universala lingvo, muziko, havas malmulte da pli talentaj praktikantoj en nia esperantista rondo. Post meritita aplaudo, sinjoro Hussey ludis kiel bispecon alian verkon de Thomas, "La Sonoriloj de Aberdyfi."

Sekvis Angla kanto, kaj tiam sinjoro Hussey, sur kies ŝultrojn talis granda parto de la koncerta laboro, denove aperis, chi fojon en dueto kun fraulino Doris Hawkins, kiu bone ludis la violonon. La "ghemesona, violona, autuna kri'" agrable kontrastis kaj kunfluis kun la dolcha ritmo de la harpo. Ili ludis "Cavatina" de Raff, kaj minueton de Beethoven.

Fraulino Sophie Slater charme kantis el "Sinjorino Papilio" (Madame Butterfly) la pecon, en kiu la heroino asertas sian kredon je la nepra reveno de sia amanto. Fraulino Slater havas naive-dolchan

stilon, kiu bone taugis al la temo, kaj la beleco de Esperanto por kantado denove montris sin. Kiel bison ŝi rekantis parton el la sama.

La sekretario de la A. E. A., sinjoro L. E. Thomson, faris mallongan parolon Angle pri la progreso de Esperanto. Tial ke la plimulto el la audantaro estis jam de longe konvinkitaj esperantistoj, li uzis la okazon por intima parolo pri la nun kreskanta forto de Esperanto kaj pri eblaj riskoj de tiu forteco mem. Bone preparita estis la parolo, kaj plena de lertaj ideoj, sed la politika flanko de la afero aperis iom pli multe, ol estas dezirinde en esperantista kunveno.

La ĉefa parto de la programo staris en la fino (kiel la gramatiko diras pri la kunmetitaj vortoj); ĝi estis unuakta komedio de nekonata aŭtoro, titolita "Ankorau Nun Chiam Mensoganto." Se la titolo vekis malnovajn rememorojn pri la lernado de Esperanto, ankau la komploto ne ŝajnis al ni tute nova; ni ne aludas tion, ke ĝi temis pri la "eterna triangulo"—edzo, edzino kaj amanto, sed la enhavo mem de la komploto: ĉu ni ne jam legis ĝin ie? Cetere, ĝi estis unu el la plej bonaj komedioj, rilate verkadon kaj ludadon, kiun ni ĝhis nun vidis sur esperantista teatro.

Estis en la komedio nur tri personoj. Oni trovas la edzinon kun la amanto, kaj ili projektas forkuri en tiu nokto mem el la domo de la edzo. Sed la edzino lasis senzorge en la salono kolekton de poemoj verkitaj de la amanto, kaj timas, ke la edzo vidos, kaj eltrovos la perfidon. La edzo efektive trovas la poemojn, kaj venas demandi la amanton, ĉu ili estas verkitaj por la edzino. La amanto indigne protestas, ke ne, ke li hontus eĉ pensi pri tia afero, verki poemojn por tiu sinjorino. Tiam la edzo koleras—ghuste tial, ke la poemoj ne estas dedichitaj al lia edzino: "Mia edzino estas la plej admirata, plej brila, plej alsopirata virino en la tuta regno; kaj vi ne opinias ŝin suŝe bona por celo de viaj mizeraj poemoj." Kaj ili terure batalas, ĝhis la edzino disigas ilin. Kaj tiam la multe batita amanto konfesas, ke la edzino estis efektive la celo de la poemoj. Kaj kiam la manpremas kore kun la amanto, kaj

chio iras bone. La komedio estis plena de sprita, vigla dialogo, kaj la audantaro ridis kaj ridetis senfine.

La rolojn ludis: de la edzino—fraŭlino Elsie Godfrey, de la amanto—sinjoro Georgeo Hussey, kaj de la edzo—sinjoro J. G. Pyke, kaj tre bone ili ludis. Oni povas nur bedaŭri, ke tiel bonaj aktoroj estis foje iom senzorgaj pri la prononco de nia facilaj kaj bela lingvo; la solaj makuloj sur meritplena prezentado estis la regula dirado de "laralia" por "la alia"; "viaredzo" por "via edzo"; "mi cias" por "mi scias"; "tiatro" por "teatro"; "recivi" por "ricevi"; kaj en vortoj, kiaj "cirkonstanco," "perdo," surda," la unua silabo rimis chiufoje kun la sama Angla vorto "fur" (kies sono ja ne ekzistas en Esperanto), anstataŭ proksimume kun la Anglaj vortoj "peer," "pare," "poor." Tamen, la komedio estis bonega.

SESAMO, MALFERMIGHU!

De Sinjorino Edgren.

Unu fojon estis—diras la fabelo.

Tiun chi fojon ghi estis oficisto, ne tre juna, kun shajno iom mizera, kiu de sia oficejo revenis hejme en la tago post sia edzigho.

La edzightagon mem li ankaŭ pasigis sidante en la oficejo kaj skribante ghis la tria. Poste li eliris, kaj kiel ordinare havis sian modestan tagmanĝon en malhela restoracio de unu el la stratetoj de la urbo; post tio li supreniris al sia chambreto sub la tegmentoj en malnova domo de la granda strato Orienta por preni sur sin la frakon, iom akarmordetitan, kiun li estis uzanta de dek du jaroj.

Li longe estis pripensinta, chu li achetos novan frakon por sia edzigho, sed li fine decidis, ke tio chi estus ja senutila lukso.

La fianĉino estis telegrafistino, iom paligita kaj malfortigita de la laborado kaj fastado, kaj neniel prezentis brilantan eksterajhon. La ceremonio okazis tute trankvile che maljuna fraŭla onklino de la fianĉino, kiu loĝhis en la Suda kvartalo. La fianĉino havis nigran robon el silko, kaj la novaj geedzoj iris al sia lognejo por luveturilo.

Tiel pasis la tago edzigha; sed nun estis la sekvanta tago. De la deka horo li estis sidinta en la oficejo tute

same, kiel en la aliaj tagoj. Nun estis sur la vojo hejmen—hejmen!

Tio estis sento stranga, sento tiel potenca, ke multfoje sur la vojo li ekhaltis en profunda pensado.

Sceno de liaj infanaj jaroj ekvenis en lian memoron. Li revidis sin knabeto, sidanta apud la skribtablo de sia patro en la malgranda vikariejo kaj leganta fabelojn. Kion da fojoj li legis kaj relegis sian preferatan fabelon el "Mil kaj Un Noktoj"; "Ali-Baba, au La Kvarde Rabistoj!" Kiel forte batis lia koro pro maltrankvila atendo, kiam kun la heroo de la fabelo, li staris antaŭ la fermita pordo de la kaverno kaj ekkriis, en la komenco mallautaj kaj iom time, poste laute kaj brave "Sesamo, Sesamo, malfermighu!"

Kaj kiam la monto malfermis siajn pordojn, kia beleĝo! La mizeraj chambro de la vikariejo subite farighis la richa trezorejo de la monto, kie sur la muroj chirkauis briladis la plej belaj juveloj; tiu trovighis ankaŭ chevaloj, kaleshoj, bele provizitaj ŝipoj, bataliloj, armiloj—chiuj beleĝoj, kiuj knabeta fantazio povas imagi.

La maljuna patro rigardis kun ekmiro sian plej junan filon: antaŭ tiel longe li mem estis infano, kaj liaj aliaj gefiloj jam estis tiel grandaj, ke li ne komprenis plu la infanojn kaj iafoje demandis lin, preskaŭ riproche, pri kio li pensas, ĉar lia okuloj tiel forte brilas.

Poste la oficisto komencis pensi pri sia vivo kiel junulo, kiam li lernadis en Upsalo. Li estis poeto rakontema: li estis rigardata kiel talentulo kaj liaj kolegoj lin altshatis. Kiu tiam estus antaŭdirinta ke li fine farighos simpla kopiisto edzighos kun pala telegrafistino kaj loĝhos sur la strato de ŝnuristoj en la suda kvartalo! Ho! La vivo prezentis mil eblajhojn; la perspektivo de la estonteco estis senlima: nenio estis neebla. Neniu honoro estis tiel granda, ke li ne povus atingi ĝin; neniu virino tiel bela, ke li ne povus gajni ŝin. Kiom malhelpis, ke li estas malricha, ke li estas nomata simple Andersson, kaj ke li estas oka filo de malricha vikario, kiu mem estis filo de vilagano! Chu ne eliris jam multaj geniuloj el la mezo de la popolo! Jes, lia genio devis esti por li la

sorcha formulo, lia "Sesamo, malfermighu!" ebligonta al li la akiron de chiuj belegoj de la vivo.

Pri tio, kio poste estis okazinta, li nun ne penis pensi. Chu lia genio eble ne estis tiel granda, kiel li pensis, chu ghin sufokis la monaj embarasoj, chu la malfelicho sola estas kulpa je chio, kia ajn estis la kauzo, al li okazis same, kiel al la malbona frato de Ali-Baba, kiu, jam enirinte en la kavernon, kun teruro ekrimarkis, ke li forgesis la sorchan formulon, kaj kun mortiga maltrankvilo serchadis ghin en sia memoro.

Malfacilajn tagojn li estis pasiginta — sed al kio utilis nun pensi pri tio?

Tiaj pensoj rapide sekvis unu la alian en lia cerbo. Subite li komencis siajn pri shia reghedzina moshto, kiu antau kelkaj tagoj faris solenan eniron en la chefurbon. Li ricevis la permeson akompani siajn estrojn kaj stari en la festa pavilono dum shia surbordi. Bela momento tio estis! La poeta kapablo de lia juneco preskau revekighis pro la soleneco de tiu horo, kaj se li estus la iama juna poeto plena je promesoj, anstataŭ la hodiaŭ nekonata oficisto, li sendube estus skribinta festan poemon kaj sendinta ghin al la gazeto "La Poshto."

Belega devis ja esti tiu tago por princino Viktoria. Ghi estis tia momento, kian ne ofte prezentas la vivo. Esti 19-jara, jhus edzinighinta kun juna edzo, ami kaj esti amata, kaj fari solenan eniron en sian chefurbon feste ornamitan kaj kushantan tie fabele belan sub la autuna suno, esti salutata per ghojkriado de nekalkulebla popolamaso kaj esti tiel malsperta pri la vivo, ke oni ne suspektas iun el la ombroj, kiuj sin kashas post la brilanta vidajho—jes, certe ghi devis esti neforgesebla momento, momento, kiu sin trovas en tiel malmultaj vivoj homaj, ke ghi plibone shajnas aparteni al la fabela mondo, ol al la reala. Kiam do la sorcha formulo "Sesamo, malfermighu!" naskis ion pli belan?

Tamen! Tamen! La oficisto estis alveninta hejmon kaj staris antaŭ sia propra vestibla pordo. Ne, la reghido, kiam li enkondukis sian edzinon en sian ghojantan chefurbon, certe ne estis pli felicha, ol li mem estis en tiu chi momento. Li estis

retrovinta la sorchan formulon, longe perditan. Tiu chi butoneto de sonorilo estis lia "Sesamo, malfermighu!" Li nur bezonos premi ghin, kaj la monto tuj prezentos siajn trezorojn—ne batalilojn kaj armilojn, kiel en lia infaneco—ne honoron, respekton kaj situacion, kiel en lia juneco—ne, ion, kio estas la kerno mem de chiuj felicho homa, tiel sur la alto de la vivo, kiel en la anguletoj plej kashitaj—koron, kiu batis nur por li, propran hejmon, kie iu malspacience atendis lin, edzino! Jes, edzino, kiun li amis, ne kun la unua juneca pasio, sed kun la fervoro kaj fideleco de la agho matura.

Li staris antaŭ sia propra pordo, li estis laca kaj malsata, kaj lia edzino lin atendis por tagmanghi. Tio estis ja tre chiutaga kaj triviala — kaj tamen tiel mirige nova kaj alloga.

Malrapide, singardeme, kiel infano ricevinta novan ludilon, li premis la butoneton—kaj tie li staris senmove, haltiginte la spiradon kaj auskultante la rapidajn pashojn, kiuj alproksimighis.

Ghi estis tute same, kiel en lia juneco, kiam li staris antaŭ la monto kaj ekkriis, komence mallaute kaj iom ghenate, poste laute kaj per vocho tremanta pro ghoja atendo:

"Sesamo, Sesamo, malfermighu!"

Tradukis Sam. Meyer.

DEZERTA RIVERETO.

Geografoj povas decidi kiu estas la plej longa rivero, kiu sin vershas en la maron Pacifkan, kaj taksi la pretendojn de la Amur, la Hoang-ho, kaj la Yang-tze-kiang. Mi mem trovis la plej mallongan riveron, kiu fluas en la plej grandan el la oceanoj.

Ghia longo estas nur du cent anglaj jardoj (cent okdek kvin metroj), de ghia komenco el simpla fonto ghis la loko, kie ghi saltas trans la krutajho en la maron, sed ghi ne estas nura eta rivero au flueto glitanta laulonge de ia kruta deklivo. Ghi estas vera malgrandega rivero, en profunde fosita fluejo, la rezulto de senchesa fluado dum nekalkuleblaj jaroj, havanta profundejojn plenajn de makulitaj montaj trutoj (Galaxias), kaj posedanta siajn proprajn malgrandegajn alfluojn. Levighante che la piedo de granda roko, ghia mallonga vojo direktighas tra kashita

valo, kiun grandaj abruptaj montetoj enfermas che ambau flankoj. Tiu valo estas plena de densega arbara kreskajho. Fine la rivereto malsupreniras glatan krutajhon pli ol sesdek metrojn en la maron.

La du duoninsuloj, kiuj dependas kiel duobla orelingo de la sud-orienta angulo de Tasmanio, prezentas sovaghe negasteman flankon al la oceano, kaj chi tio estas nepre vera pri la plej norda el ili, tiu, kiu nomighis pro honoro de la Franca esploranto, Forestier.

Etendighante multe da mejloj, grandegaj krutajhoj, sen ia ebenajho, formas la marbordon. La ondegoj de la suda oceano chiam bolas en blanka shaumo chirkau iliaj piedoj, dum supren altighas minacaj krutajhegoj el nigra roko. En kelkaj lokoj la rekte staranta krutajho estas alta pli ol tri cent metrojn, kaj supren etendighas ankoraŭ tri cent metrojn plu, deklivoj apenau malpli krutaj, sed provizantaj sufichan piedotenon por fortikaj arbitoj kaj por la sovaghaj kaproj, kiuj sur ili manghetadas.

Kvankam ne ekzistas ia rompo en la krutajharo, en certa loko ili abrupte malaltighas, kie spaco inter du grandaj montetoj malfermighas al la maro. En la fundo de chi tiu montofauko kushas la eta sennoma rivero, tiel kashata kaj izola, ke ghia ekzistado ne estas konjektita ghis la momento, kiam oni vidas ghin che la piedoj. La sola maniero por atingi ghin estas per longa malfacila marshado el la enlando trans la duoninsulo, kaj finfine la kapo de la eta valo estas gardita de zono de dornaj arbitoj tiel densaj, ke la plej facila metodo trapenetri ilin estas rampi sur la manplatoj kaj piedoj. El la mara flanko ghi estas absolute nealirebla. La rivereto tranchis por si mem nichon tridek metrojn profundan en la krutajho, sed aldonita al tio restas ankoraŭ distanco de sesdek metroj ghis la nivelo de la maro, kion nenio krom birdo povas supreniri. Ne estas ia loko malsupre, kie oni povas elshipighi je la mara flanko.

Atingi chi tiun izolan akvoflueton, do, postulas malrapidan kaj penegan iradon super rokaj montetoj kaj tra densaj kaj kunplektitaj amasoj de vegetajharo kaj, fine, malsupran

grimpadon sur abruptaj rokmuroj glitigaj je musko. Char ghia flue kushas en fendego, kiun ghi trabon en la grande kavejo por atingi la malgrandan riveron oni devas grimpi kie faletoj eble rezultigus rompitan membron. Sed simila al perfekta juvelo, la belececo de la vidajho estas pliigita de ghia stranga kaj sovaghaj chirkauajho. Kreskajhoj en preskau tropika abundeco plenigas chi tiun shirmitan valeton. Arbflikoj —ne la ofta speco, sed la gracia maldika "regha" fliko, kies trunketo estas kovrita per delikataj haroj— altigas siajn kronojn dek kaj dek du metrojn en la aero. La odora musko arbo, kun siaj strangaj dubebblankaj verdaj folioj, la sasafroso, kun sia malhelverda dentforma foliaro, la "ledakapo," kies ebure blankaj floroj vidighas kiel steloj en la amasoj de verdajho, kaj cent aliaj diversaj specoj de arbo kaj arbeto plenigas la mallarghan valeton, kaj direktighas supren al la strio de chielo, kiu vidighas inter la muroj.

Chie estas muskoj el delikata formo kaj tekseco, mirinde molaj kaj belaj. Ili tapishas chiujn rokojn, krom tiuj, kiuj estas efektive akvolavataj, volvas sin chirkau la falintaj arboj, kaj pendighas de la trunkoj kaj branchoj de la starantaj. Maloftaj kaj belegaj filikoj havas radikojn en chiu fendeto kaj angulo. Nur ghuste che la busho de la valetoj, kie la malgrandega rivero falas en la maron, estas ebla ia videto de la ekstera mondo. Kadrita che ambau flankoj per la muroj de la fauko kaj sin etendanta ghis senlimeco estas triangula parteto de la maro. Chie aliloke la videbla mondo estas limigita al strio kelkajn metrojn largha sin etendanta laulonge de la rivereto, supre kaj malsupre, je distanco de nur dudeko da metroj. Shajne, ne ekzistas ia birda au besta vivo en chi tiu verda mondo, krom malmultaj arbetaraj rubekoloj, kiuj venas serchante insektojn; sed la malgranda rivero mem estas tre loghata, kaj la ekzisto de ghiaj loghantoj estas enigmo, al kiu estas malfacile trovi respondon. Chiu malgranda flustarejo havas sian aron da makulitaj montaj trutoj. Ili vivas senzorge, la estroj de la rivereto. Ne alestas angiloj por timigi ilin, kaj la manghavidaj markorvoj, kiuj preskau ekstermis

chi tiujn belegajn fishetojn en tre multaj pli alireblaj riveretoj en chi tiu regiono de Tasmanio, ankoraŭ ne provis chi tiun malproksiman kaj zolan komunumon. Sekve de chi tiuj favorantaj cirkonstancoj, la trutoj kreskas ghis grandeco tute ne proporcia al sia malgrandega loĝloko. Mi kaptis multe da miloj da indigenaj trutoj en diversaj akvofluoj, sed la plej grandan el chiuj mi hokis en la kashita rivereto: ĝhia pezo estis precize duono da angla funto, t.e. 227 gramoj.

Sed kiamaniere la trutoj lokighis tie komence? Sub la nunaj kondiĉoj nenia fisho povus atingi la riveron el la maro, escepte se ĝi povus grimpi krutajhon sesdek metrojn alta, kaj la plej proksima rivero terflanke estas tri kilometrojn malproksima trans la montetoj. Rilate fishojn en izolaj fluoj de akvo, oni iufoje klarigas, ke la fraĵo estas portita tien per birdoj. Sed neniam birdoj, kiuj povas porti la fraĵon de brunaj trutoj, vizitas chi tiun riveron, kaj ekzistas nenia postesigno, ke ili iam tion faris. La sola solvo, kiun mi povas imagi, estas ke la fishoj vivis en la rivereto de tempo en la tre malproksima pasinteco, kiam la cirkonstancoj estis tre malsimilaj al la nunaj. En prahistoriaj tempoj kiam Tasmanio estis parto de teramaso kuniganta Australion kun Antarkta Kontinento, chi tiu malgrandega rivero, nun tiel sendependa, eble estis membro de riveraro, kiu poste subighis sub la Pacifika maro. Shajnas ke chi tiu nemulto da trutoj en siaj kelkaj metroj de rivereto, estas vivantaj en vera Tibeto de la fisha mondo, disigite dum multe da epokoj de chiu alia el sia gento. Regnoj floris kaj pereis, kontinentoj malaperis en la maron, kaj ree levis sin; ech tutaj mondoj forbrulis au falis en neelireblan ruĝon dum chi tiuj fishoj vivadis en sia malgranda aparta mondo. Eble la plej revolucia okazo, kiu iam sin trudis en ilian malgrandan respublikon estis la veno de hoko, kiun mi portis tien, la unua iam malleŭita en ilian rivereton, de kiam komencighis la mondo.—Angle verkis T.D. en Melburna gazeto "Argus," kaj tradukis Karlo Madrigalo,

"THE ESPERANTO GUIDE."

TRANSLATION OF THE EXERCISES.

Exercise 10.—Sinjoroj, mi deziras al vi bonan matenon. La fraŭlino ne amas birdojn. Aleksandro estas tiel forta, kiel Teodoro, sed li ne estas tiel bona. Mi manghas la dolĉan pomon, kiun mi trovis sur la fenestro. Miaj junaj amikoj rakontas al mi belajn anekdotojn. Mia onklo estas pli obstina, ol mia onklino. Bonan nokton, sinjorino! Miaj fratoj diras, ke lakto estas tiel blanka, kiel negho. Kia bela tago! Papero estas malpli blanka, ol negho, kaj vino estas malpli nutra, ol lakto. El chiuj miaj amikoj, Ernesto estas la plej juna. Mi havas la plej freshan panon el chiuj. Ne, Johano, vi eraras, mia pano estas tiel fresha, kiel via (or: la via). La plej forta homo ne estas tiel forta kiel leono. La leonino estas pli dange-
ra, ol la leono. Maldolĉa; malamiko; malbela; malfresha; malgrabila; malpura; malforta. Patrino: fraterno; filino; knabino; amikino.

Exercise 28.—La oka regulo de nia gramatiko diras al ni, ke chiuj prepozicioj per si mem postulas nur la nominativon. Foje post prepozicio ni trovas la akuzativon; sed en tiuj okazoj la akuzativo dependas de aliaj kauzoj, ol la prepozicio; ekzemple, por montri direkton. Sed oni neniam uzas la akuzativon por esprimi direkton post la prepozicioj "al" kaj "ĝis," ĉar chi tiuj vortoj jam enhavas la ideon de direkto. Vi iros al li, kaj restos tie, dum li venos chi tien. Kien vi kuras? Disighu, kaj iru en diversajn direktojn. Turnu vin dekstren, sinjoro; kiam vi venos sur la korton, turnu vin maldekstren. Vi povas jheti tion flanken; ni ne bezonos ĝin.

(Next month: Exercises 11 and 29).

"La Suda Kruc" is an independent journal, and is not published by the A. E. A. or by any other Esperanto group. The note, "Published by the Australian Esperanto Association" in the last number was inserted by the printer without reference to the redakcio.

EL LA DIROJ DE GAUTAMA BUDDHA.

Felicha estas tiu, kiu venkis chian egoismon; felicha estas tiu, kiu atingis la pacon; felicha estas tiu, kiu trovis la veron. Homo, kiu staras sole, decidinte obei la veron, eble estos malforta kaj refalos en siajn malnovajn vojojn. Tial vi staru kune, helpu unu alian, kaj fortigu unu la penojn de alia. Estu kiel fratoj; unu en amo, unu en sankteco, kaj unu en via fervoro por la vero.

AL KRISTOFORO KOLUMBO.

Vi trafis per kuragh' kaj per talento la celon de plej granda l'aventuro, vi venkis povajn fortojn de l' Naturo, char vin respektis fulmo, mar' kaj vento.

Vi la perfidon de l' envia sento venkis, char nek ofendo nek riprocho nek ech la kalumnio nek murmuro rabis gloron al via monumento. De multaj novaj civilizacioj via grandega far' estis la fondo, origino de rasoj kaj nacioj; vi estis regho de la mara ondo. Eterne gloru la generacioj vin, eltrovinto de la Nova Mondo!

Rafael de San Millan.

"MI ESTAS FERVORA KOLEKTANTO—

de poshtmarkoj; chu vi bonvolas sendi al mi kelke da poshtmarkoj de via lando?" Mi kredas, ke chiu Australia Esperantisto, kiu korespondas kun la alilando, ricevis iam, ech ofte, tiun peton. Australio estas lando tre interesa por la filatelistoj, pro la granda nombro da diversspecaj

markoj eldonitaj en la ses provincoj antaŭ ol la federa registaro entrepreninte la poshtadministracion decidis eldoni unu solan serion por la tuta federacio.

Sed, en Australio, la filatelo havas multajn adeptojn inter Esperantistoj. La nefilatelisto, petio, ofte deziras ekkoni filatelan samideanon, al kiu li povus transsendi la peton de sia korespondanto pri intershanghado de markoj. "La Suda Kruco" volonte presos senpag la nomojn de tiaj samideanoj.

Filatelisto-Esperantistoj en Australio, helpu viajn samlandanojn kiuj ne estas filatelistoj, kaj helpu viajn samideanojn, kiuj deziras kolekti Australiajn kolektantojn! Sendu "La Suda Kruco" vian nomon kaj adreson, kaj ankau, se vi volas, diu vian filatelan preferon. Ni tiel helpos nin reciproke.

AL LA GRUPOJ.

Kie vi estas, kion vi faras, ho, karaj fratoj vi miaj?

Ni scias, ke en diversaj lokoj situas agemaj grupoj; sed ni ne scias pri ilia agado. La perdo estas nia kaj de la tuta Australia Esperantistaro.

Tial ni petas la grupsekretariojn bonvolu sendi al "La Suda Kruco" mallongajn raportojn pri via agado. Chio, kio okazas en la Esperanto-rondo interesas la Esperantistojn, ekskurso, propaganda kunveno, jar kunveno, debato, artikolo en gazeto, aludo de eminentulo pri Esperanto, elekto de nova komitato, au eblu edzigo de samideano!

Sendu al ni la raportojn, ni petas.

"La Suda Kruco."

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Published by the Australian Esperanto Association, and printed by Fraser & Morphet, Eastbourne Street, Prahran.